1 La komenco de la evangelio de Jesuo Kristo, Filo de Dio. 2 Kiel estas
skribite en Isaja la profeto: Jen, mi sendas mian senditon antaŭ via vizaĝo,
kiu preparos vian vojon. 3 La voĉo de krianto en la dezerto: Pretigu la
vojon de la Sinjoro, rektigu liajn irejojn. 4 Venis Johano, kiu baptis en la
dezerto kaj predikis la bapton de pento por la forigado de pekoj.